

JOSEF ŜEMER



1950-2012

KORO DE LA ISRAELA ESPERANTO-MOVADO

AMATA TRA LA MONDO



Memorante Josi

Karaj geamikoj,

Reveninte de la entombiga ceremonio trovighis en mia retposhta kesto multaj kondolencaj mesaghoj de geamikoj kaj konatuloj de Josi en la tuta mondo, kaj ili daure alvenas. Jen ili en la ordo de alveno.

Multaj aliaj (kopiitaj chi sube) troveblas en Libera Folio

<http://www.liberafolio.org/2012/forpasis-josi-semer#>

kaj en la Facebook-paghoj de Eldad

<http://www.facebook.com/eldad.salzman>

kaj de mi

<http://www.facebook.com/profile.php?id=1530849334>.

Entute preskau 50 paghoj...Koran dankon al chiuuj,

Amri Wandel

Prezidanto de ELI

זוכרים את יוסי

חברים יקרים,

חזרנו מההלוייה ותיבת הדוא"ל מלאה במכתבי תנחומים של חברים ומכרים של יוסי בכל העולם, והם אינם פוסקים מלהגיע. ריכזתי אותם לפי סדר הגעתם. הודעות תנחומים רבות

נוספות (בהמשך) הגיעו לאתר החדשות האספרנטי Libera Folio ולדפי הפייסבוק של

אלדד ושלי. בסה"כ כמעט 50 דפים...תודה לכולם,

עמרי ונדל

יו"ר האגודה לאספרנטו בישראל



מילות פרדה מיוסי (עמרי בהלוויה)

יוסי - במשך יותר מארבעים שנה היית מעמודי התווך של תנועת האספרנטו בישראל. אהוב על כולם, בארץ ובעולם. משכמו ומעלה, תרתי משמע. בטיולים ובכנסים היינו מתבדחים שאם הולכים לאיבוד בהמון, אפשר לחפש את יוסי שרואים אותו למרחוק. יו"ר האגודה לאספרנטו ואחרי כן, ועד עתה – מזכיר וגזבר. יותר משלושה עשורים שנינו מובילים את תנועת האספרנטו בישראל. נדמה שמאז ומעולם ניהלת את מועדון האספרנטו בתל אביב, כל יום שלישי. הוא הפך לחלק מחייך: כשהיו באים חברים רבים מהרגיל היית מאושר, לעיתים מתקשר כדי לספר... וכשהיו רק מעטים היית דואג ועצוב. במשך כשני עשורים ערכת את הבטאון Israela Esperantisto, וגם בשנים האחרונות, בהן אני עורך, אתה כותב ומביא מאמרים רבים, מגיה ומיעץ. בשנים האחרונות כתבת בבטאון סדרת מאמרים על תולדות אגודת האספרנטו בישראל, אותה לא זכית לסיים. תמיד היית כותב את מאמרי ההספד על חברים שהלכו לעולמם, ומי יכתוב את ההספד עליך? תמיד אתה נכון לעזור, לתקן וללמד. גם מרצה מוכשר ופופולרי. לפני כשנה הרצנו במקביל בכנס החורף בגרמניה, והתבדחנו שאנו מתחרים בינינו על הקהל. אמרתי שבוודאי הרוב יגיעו להרצאה שלך (על העברית) וכך היה. ההרצאה שלך "מיהו יהודי" בכנס העולמי בקובה לפני כמעט שנתיים היתה מלאה עד אפס מקום. בדיחות ההומור היהודי שהיית שולח באינטרנט מדי שבוע למאות אספרנטיסטים ברחבי העולם הפכו לשם דבר. לפני שיצאת לניתוח כתבת שתהיה הפסקה של כחדשיים בבדיחות... ועכשיו נראה שההפסקה תמשך לנצח. היו לך הרבה תכניות סביב האספרנטו שעוד רצית להגשים, ובפרט מאז הפנסיה, כשהתחלת לסוע לכנסים ברחבי העולם, וכעת מי יגשימן? אני מקווה שכל משפחת האספרנטו בישראל, ותהיה זאת הדרך בה נזכור אותך. Adiau

Adiaŭaj vortoj de Amri en la entombiga ceremonio

Josi - dum pli ol kvardek jaroj vi estis kolono de la Esperanto-movado en Israelo. Amata de ĉiuj, en- kaj eksterlande. Elstara kaj altstatura, dusence. Dum vojaĝoj kaj kunvenoj ni ŝercis ke se perdita en la homamaso, oni povas serĉi Josi, kiu videblas de malproksime. Prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo kaj poste, ĝis nun - Sekretario kaj Kasisto. Pli ol tri jardekojn ni kune kondukas la E-movadon en Israelo. Shajnas ke eterne vi gvidis la E-klubon en Tel Avivo, ĉiu marde. Ghi fariĝis parto de via vivo: kiam venis pli multaj partoprenantoj ol kutime vi estis feliĉa, kelkfoje vikis min por rakonti ... kaj kiam estis nur malmultaj vi estis zorganta kaj malfeliĉa. Dum du jardekoj vi eldonis la bultenon Israela Esperantisto, kaj en la lastaj jaroj, kiam mi ĝin redaktas, vi skribas kaj alportas multajn artikolojn, provlegas kaj konsilas. En la lastaj jaroj vi skribis en la revuo serion da artikoloj "rememoroj de ELI-veterano", sed ĝi restis nefinita. Vi ĉiam skribis la nekrologojn por membroj kiuj forpasis, kiu skribos la nekrologon vian? ĉiam vi pretas helpi, korekti kaj instrui, talenta kaj populara preleganto. Pasintjare ni prelegis paralele en la Internacia Festivalo en Germanio, kaj ni ŝercis ke ni konkurencis pri la publiko. Mi diris ke certe oni pli vizitos vian prelegon (pri la hebrea) kaj tiel estis. Via prelego "Kiu estas Judo" en la Universala Kongreso en Kubo antaŭ preskaŭ du jaroj estis plenplena. La ŝercoj pri juda humuro kiujn vi sendis ĉiusemajne al centoj da sekvantoj ĉirkaŭ la mondo fariĝis ege popularaj. Antaŭ la operacio vi skribis ke estos paŭzo de du monatoj en la ŝercoj ... kaj nun shajnas ke la paŭzo daŭros eterne. Vi havis multajn planojn por Esperanto-agado, precipe post la pensiigho, kiam vi komencis vojaĝi al E-kongresoj kaj konferencoj ĉirkaŭ la mondo, kaj nun kiu ilin plenumos? Mi esperas ke tion faros la Esperantisto en Israelo, kaj tiel ni rememoros vin. Adiaŭ.

תרגום לעברית של מכתב התנחומים מנשיא ארגון האספרנטו העולמי UEA
Probal Dasgupta שיהושע קרא בהלוויה

Hebrea traduko de la mesagho de la prezidanto de UEA

מכובדיי,

בצער רב ובשוק נודע לי בדואר אלקטרוני מעמרי ונדל על מותו של יוסי שמר ב 29 במרס.

יוסי היה לא רק חבר אישי שלי בכנסים רבים, אך גם מחוץ לעונת הכנסים היינו מתכתבים בדואר, והעביר לי בכנות ונדיבות ומחשבות אישיות לחלוטין. הוא היה אדם שהצליח להכיר באנושיות של אחרים מעבר למחסומים, גם את אלה שלא היו קרובים מאוד אליו, ולתקשר בדיקנות הכרה זו. זוהי תכונה נדירה מאוד, חיונית במיוחד בתנועה המבוססת על קשר בין אנשים, שאינה ניתנת ללימוד בקורסים. היעלמותה של דמות ייחודית זו הותירה את קהילת האספרנטו פגועה, וכך גם את העולם האישי שלי.

יוסי לא השתמש במילים מתוקות כדי לבטא את יכולתו להרגיש ולהעביר את האנושיות של אחרים. הוא עטה חיצוניות של מלח והשתמש במשחקי מילים שונים מהסוג שנוצר על ידי ריימונד שוורץ. האמנות שלו, החיוניות שלו, על נכונותו להתמודד עם אכזריותו של העולם ושל ההיסטוריה, מאוד תחסר לי, וללא ספק גם לאלפים אחרים, שהכירו את האיש המאוד ידידותי הזה.

לא רק לחבריו הישראלים אני מביע את תנחומי. הוא יצר כוכב לכת נפרד, ואני שולח ניחומים לכל אלה, אשר, כמוני, קבל בברכה על הפלנטה הזאת שלו.

בצער
Probal Dasgupta
כלכותה, הודו

הודעה על פטירתו של יוסי בתכנית רדיו פולין באספרנטו

Barbara Pietrzak (Pollando)

E_elsendo el la 30.03.2012

RetRadio 30.03.2012.mp3 (21.58 MB)

La hodiaŭa vendreda E-elsendo de la Pola retRadio ĉe <http://retradio.posterous.com> enhavas la kulturan bultenon kaj E-informojn. Kun profunda bedaŭro la Redakcio adiaŭas la forpasintan Josi Shemer el Israelo. La programom kompletigas renkontiĝo kun la aŭskultantoj kadre de la ĉiusemajna Leterkesto

Retmesaghoj

הודעות בדוא"ל

29.3, 20:30

Karaj geamikoj,

Anatu kelkaj minutoj atingis min (pere de Eldad kaj la fratino de Josi) la shoka sciigo.

Tio okazis antaŭ du horoj, post malbonigho en lia post-operacia situacio en la lastaj tagoj.

Mi nun informas nur la proksimajn geamikojn kaj aktivulojn.

Tuj kiam ni scios pliajn detalojn (unuavice pri la entombigo) mi sendos mesaghon al chiuj membroj kaj internacie.

Funebre, Amri

30.3, 01:30

Al ELI-listo, Komitato de UEA, Landa Agado de UEA

Karaj geamikoj,

Mi devas dividi kun vi shokan, malghojegan sciigon: anatu kelkaj horoj forpasis Josi Shemer, 61 jaragha. Unu el la pilieroj de la israela Movado dum pli ol kvar jardekoj kaj internacie konata kaj shatata esperantisto, li long jare estis redaktoro de la revuo "Israela Esperantisto", antaŭa prezidanto de ELI kaj nun ghia sekretario kaj kasisto. Dum multaj jaroj kaj ghis nun li senlace gvidis la Tel-Avivan klubon kaj estis UEA-delegito en Tel Avivo. Pasintmonate li pasis komplikan operacion el kiu li estis malrapide resanighanta, sed en la lastaj tagoj lia situacio severe malbonighis.

La entombigo okazos hodiaŭ (vendrede) je la 11-a horo, en la tombejo Kirjat Shaul, sude de Ramat Hasharon apud la krucigho Kfar Hajarok.

Dolore kaj funebre,
Amri

Amri Wandel

Prezidanto de E-Ligo en Israelo (ELI)

amri@huji.ac.il

<http://www.esperanto.org.il/>

5.4.2012 Al ELI-listo

Karaj geamikoj,

Okaze de la pasko-festo mi devus tradicie deziri al vi felichan paskon, ghojan printempo-feston ktp. Tamen, chi foje pasko alvenas sub la malghoja ombro de la forpaso de Josi Shemer, antau unu semajno. Alvenis preskau ducent kondolenc-mesaghoj de la tuta mondo, rete, en Facebook kaj en Libera Folio. Ili estas kolektitaj en la memorpago por Josi videbla en nia hejmpago <http://www.esperanto.org.il/>, kaj farighos parto de memorlibro eldonota de ELI.

Post la paska ferio, la 17.4, okazos en la Tel Aviva klubo memor-vespero kun la familio de Josi. Chiu kiu deziras povos rakonti personan memorajhon, kiu eniros la memorlibron.

Estas kutimo donaci okaze de pasko. Chi paske ELI havas por vi specialan donacon, kiun ni dedichas por la memoro de Josi. Antau unu monato mi proponis al la usona reghisoro Sam Green hebreigi lian bonegan videon "La Universala Lingvo" kaj ricevis lian benon. Nia reghisoro Gian Piero preparis testo-version de la unuaj 3 minutoj kun hebreaj subtitoloj, kiu estas videbla che <http://vimeo.com/39790640>. ELI planas intense uzi la videon por informado pri Esperanto en Israelo okaze de la 125a jubileo.

Havu belan feston,
Amri

Amri Wandel
Prezidanto de E-Ligo en Israelo (ELI)
<http://www.esperanto.org.il/>

חברים יקרים,
הייתי אמור לברך אתכם בברכה המסורתית של פסח שמח, חג האביב וכולי, אלא שהפעם חג הפסח מגיע בצל פטירתו של יוסי שמר, לפני שבוע. הגיעו כמעט 200 הודעות ניחומים מכל העולם, הן מופיעות בדף הזיכרון באתר שלנו, <http://www.esperanto.org.il/>, ויהיו חלק מספר זיכרון שנוצא. אחרי חופשת הפסח, בתאריך 17.4 יערך במועדון האספרנטו בביכורי העיתים ערב זכרון ליוסי בהשתתפות המשפחה. מי שירצה יוכל לספר זכרונות אישיים, שיכנסו גם הם לספר הזכרון.

יש מנהג להעניק מתנות לכבוד פסח. הפעם אל"י מגישה לכם מתנה מיוחדת, המוקדשת לזכרו של יוסי. לפני כחודש הצעתי לבמאי האמריקאי סם גרין לתרגם לעברית את סרט הוידאו המצוין שהפיק לפני כשנה על אספרנטו וקבלתי את ברכתו. במאי הבית שלנו, גיאן פירו, הכין גרסה נסיונית של שלש הדקות הראשונות עם כתוביות בעברית: <http://vimeo.com/39790640>.

חג שמח,
עמרי

Reagoj kaj kodolencoj retposhte תגובות והודעות תנחומים בדוא"ל

29.3.2012

אני בהלם. קיוויתי שלא הבנתי נכון את האספרנטו...
תודה שכתבת לי גם בעברית.
אני לא יכולה לומר לך כמה אני עצובה.
יוסי היה חבר נהדר שלי.
מיכל.

Mi estas ege shokita kaj malghoja.
Ghi estas ne imageble perdo, movade kaj persone.

Funebere, Eran Vodevoz (Israelo)

Mi estas ŝokita: la vivanta motoro de nia movado, esperantisto en la animo, rekonata ankaŭ internacie, la ĉiama ŝercanto, la lingvo-ludanto – ne ekzistas plu!

Sciigu pri la entombigo (eble morgaŭ?), kaj nepre la internacia komunumo devas scii pri li – li ja havis tre multajn geamikojn en la mondo.

Triste pro la frua perdo de bona amiko -
Gabi Zeevi (Israelo)

Karaj Samideanoj,

Kiam finigxis antauxnelonge nia monata kunveno cxe Martha, ni ankoraux ne sciis, sed survoje hejmen atingis nin la terura novajxo: nia kara Josi Sxemer, unu el la mondkonataj israelaj esperantistoj kaj el la cxefmotoroj de la Israela Movado, forpasis antaux kelkaj horoj en la hospitalo Bejlinson, ankoraux ne 62-jaragxa.

Kiam estos konataj al mi la detaloj pri la entombigo, mi tuj informos vin.

Estu benataq lia memoro!

Funebre,
Jehosxua Tilleman (Israelo)

Amri,

Mi simple povas nek kredi nek digesti, ke Josi forpasis!

Bonvolu daŭre ĝisdatigi nin.

Tsvi Sadan (Israelo)

Karaj,

La entombiga ceremonio okazos morgau en Kirjat Shaul, la civila tombejo, je la 11a horo matene.

Funebre,
Eldad Salzman (Israelo)

חברי היקרים מאוד

אהבתי את יוסי והוא היה לי חבר קרוב וטוב. איבדנו איש יקר באופן אישי ולכל החברים והארגון. הצער הוא גדול מאוד.

תנוח נשמתו בגן עדן (שם המקום של הצדיקים)

בברכה, נאווה צינורי

Kara Amri,

Moshe jhus informis nin pri la forpaso de Josi Shemer. Tio estas granda bato. Josi estis optimisma pri resanigho. Sed mi konscias ke tiuj mesaghoj estas malnovaj.

Mi kondolencas al la familio, precipe al Shaul kiun ni konas persone. Mi al ELI kaj al la Tel-Aviva klubo sendas kondolencajn sentojn. Via asocio perdas unu el la chefaj motoroj! Homo, al kiu ni chiuj shuldas pro la energio, la optmista laboremo, la kreema kaj organiza talento. Mi memoras lin kun bedauro kaj kun amo. La plej bona respekto al lia vivo estas daurigo de lia laboro por la movado.

Ans Bakker (Nederlando)

Karaj israelaj amikoj!

Ni funebras kun vi pro la shoka novajho - forpaso de Josi Shemer. Estu hela memoro pri li!

Boris kaj Esther Kolker (Usono)




Kara Amri,

Mi ŝatus diri al Josi Ŝemer, ke mi bone konservis la bildkarton kiun li donacis al mi en 1979 en la trajno inter la IJK kaj UK kongreso en Lucerno, sed bedaŭrinde estas tro malfrue.

En mia taglibro de 1979 mi skribis, ke mi bone babilis kun Josi en la trajno kaj ke li multe ŝercis kaj vortludis, mi eĉ enskribis du ekzemplojn en mian taglibron in-formojn kaj ĉevalo ĉevalo.

Kondolencojn, amike de Nicole (australio)



Bv. aldoni mian kondolencon kaj aflikton al familianoj kaj kolegoj de kara, neforgesebla, neanstataŭebla Josi.

||Arnold VICTOR, New York City, <arvimideQ@Wearthlink.net>

Tio estas vere shoka novajho, Amri –

kaj granda perdo por la E-movado. Bonvolu transdoni al lia familio miajn kondolencojn kaj tiujn de Jane.

Humphrey Tonkin (Usono)

Estimataj,

De retmesagho de Amri Wandel, mi eksciis kun granda shokigho kaj malghojo pri la forpaso de Josi Shemer la 29an de marto.

Josi estis ne nur chiukongresa persona amiko mia jam de multaj kongresoj, sed ankaŭ ekster la kongresa sezono rete korespondadis kun mi, disponigante el sia sincera kaj malavara koro tute personajn pensojn. Li estis homo, kiu kapablis trans shiboletoj kaj bariloj rekoni la homecon de aliaj, ankaŭ de tiuj ne tre proksimaj al li, kaj trafe komunikadi tiun rekonon. Tio estas ege malofta kvalito, aparte bezonata en nia movado de homoj kun homoj, kaj ne instruebla en kursoj. La malapero de lia ekzempligo de tiu kvalito lasas la komunumon grave vundita, kaj fortiras de mia persona mondo unikan figuron.

Josi ne kutimis esprimi per vortoj mielaj sian kapablon senti kaj sentigi la homecon de aliaj – li shajnis porti maristan eksterajhon – kaj li praktikis tiutonan arton de intence agaceta vortludemo frape malsama ol la ghenro kreita de Raymond Schwartz. Lia arto, lia viveco, lia preteco alfronti la kruelecon de la mondo kaj de la historio, ege mankos al mi, kaj sendube ankaŭ al miloj da aliaj, kiuj konatighis kun tiu ege amikighema homo.

Ne nur al liaj samisraelanoj mi esprimas miajn kondolencojn. Li kreis apartan planedon; mi kondolencas al chiuj, kiujn, same kiel min, li bonvenigis sur tiun sian planedon, civitanige.

Funebre

Probal

Probal Dasgupta
Kolkata, India

Kvankam la informo estas tristega mi dankas al vi karaj geamikoj. Cxu vere forlasis nin via/nia Josi? Mi persone kaj multaj aliaj tute ne povas imagi la izraelan movadon sen li. Ne nur movadon... La alproksimigis al ni Izraelon tiom ke ni sentis tie hejme. Kutimaj kondolencfrazoj ne sufixas. Eble pli taugas deziron ke generaciojn kiuj alvenas ne "okupigxu" pri Esperanto, sed ke ili "vivu" gxin same kiel ni junagxe. Josi montris al ni la vojon.
amike

Judita Rey Hudeček
prezidantino de Kroatia Esperanto Ligo

Shokita novajho venis de mia lando hodiaux. Forpasis vera SAM-IDE-ANo. Malfacile kredi je tio.

Miajn tutkorajn kondolencojn al cxiuj.
Funebrante via cxiam israela amiko –
Alexander (Sasha) Mikishev

Kara Amri,

la sciigo pri forpaso de Josi konsternis min!
Tiom vivogxoja kaj vivoplana homo li estis, ke apenaux kredebla estas uzo de la vorto "estis" rilaate al li...
Bonvolu akcepti miajn sincerajn kondolencojn!

Moisej Bronshteyn (Rusio)

Karaj geamikoj en Israelo,

Sincerajn kondolecojn!
Ne nur vi sed certe ankaŭ multaj aliaj esperantistoj en la mondo funebros pro la ege trista novaĵo.

Mi havis la honoron kaj plezuron konatiĝi kun li okaze de tri kongresoj, krom tio ni sufiĉe ofte korespondis. Ĉiam mi memoros Josin kiel bonkora, afabla, apogema kaj sprita homo.

Kondolece kaj amike mi salutas vin.
Betty Chatterjee

Kun doloro Dana Esperanto-Asocio esprimas sian kondolencon al la familianoj kaj al ELI pro la frua forpaso de Josi Shemer.

Ileana Schrøder (Danio)

karaj gekolegoj
en granda tristeco mi ekscias pri la anonco de la forpaso de Josefo. Li estis kolego mia en la komitato de UEA kaj chiam mi shatis la kontaktojn kun li.
Miaj kondolencoj iras al lia familio kaj al la israela movado.

elkore salutas el Oberammergau, Sud-Germanio
Mirejo
Kom A por Svislando

Armenaj esperantistoj, mi persone kondolencas al familianoj de kara Josi Shemer
kaj membroj de Israela E-Ligo kaj dividas vian doloron.

Funebre

Susanna Baghdasaryan
Prezidanto de Armenia Esperantista Ŭnuiĝo

Estimata s-ano Amri Wandel,

Bonvolu transdoni niajn kondolencojn al la familianoj de Josi.
Nome de la esperantistoj el Aŭstrio.
Kun sinceraj salutoj,

Leopold Patek, ĉefdelegito de UEA por Aŭstrio.

Tristajn salutojn de esperantistoj en Nowy Sacz, kie Josi havis de multaj jaroj amikecajn rilatojn kun nia E-Klubo!
Ni aldonas sincerajn kondolencojn al Liaj Proksimuloj kaj al la Israelaj Movadanoj. Josi estis ja parto de nia E-Movado, Lian perdon sentos ni cxiu en Esperantujo...

Halina Komar (Pollando)

Kara Amri:

Kun kortusxo mi legas vian malagrablan novsajxon pri la forpaso de nia amiko Josi. Mi sendas al vi cxu miajn tutkorajn kondolecojn.

Amike. Josep Franquesa

Ni jxus legis la malgxojigan informon.

Nome de burundaj esperantistoj, mi sendas elkoran kondolencon al la familio de la forpasinto kaj al la israelaj esperantistoj.

J  r  mie (Burundio, Afriko)

Temas pri terura novajho. Mi havis la agrablan sperton renkonti lin kelkfoje dum UK-oj. Li estis vere simpatia homo kaj konvinkita esperantisto. Estis li kiu atingis ke Google salutu la naskighdatrevenon de Zamenhof per bela Esperanta flago, la 15-an de decembro 2010, chu ne?

Kunfunebre,

José Antonio Vergara (Chilio)

Ankaŭ mi funebras la morton de Josi, ĉe kiu mi gastis ankoraŭ pasintsomere okaze de tutmonda vikipedia renkontiĝo en Israelo.

La rakonto pri li kiel kaŭzinto de la Google-omaĝo de Esperanto en 2009 tamen estas mito. Miamemore li mem foje malkonfirmis tion. Li simple nur estis inter la unuaj kiuj disvastigis tiun informon. Multe pli verŝajne kulpas mem la neformala esperantista grupeto ene de la dungitaro de Google, kies ekziston oni lastatempe oficiale malkaŝis lige al la enkonduko de Esperanto en Google Translate. Ekskluzivajn informojn pri tio ricevitaĵn de Google mi publikigis en la lasta numero de revuo Esperanto.

Marek Blahuš (Chehio)

Kara samideano Amri Wandel,

Kun granda bedaŭro ni eksciis hodiaŭ pri la neatendita forpaso de nia israela kolego Josi Shemer. Li estis eksterordinara esperantisto, senlaca aganto kaj simpatia homo, kiu oferis multon al la internacia E-movado kaj aparte al la israela E-movado. Estu ke en la spirita mondo, kien lia animo nun vojaĝas, li havu pacan kaj eternan lokon...

Bonvolu transdoni al la nun trista familio de Josi Shemer la plej sincerajn kondolencojn de la esperantistoj de Rumanio.

Kun bedaŭro,

Mihai Trifoi, Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Rumanio

Ankaŭ mi ege bedaŭras kara. Antaŭ nelonge li skribis al mi ke li ne kapablas vojaĝi plu eksterlanden. Mi pensis ke tio estas nur portempa malsano. Nun mi sciigas pri lia forpaso. En la jaro 2001 li vizitis ankaŭ Albanion kune kun grupo de 12 diverslandaj esperantistoj, ni kune pasigis agrablan semajnon. Poste mi renkontis lin ankaŭ en Firenze kaj Roterdamo okaze de tieaj UK. Danke al li mi ricevas regule la revuon Israela Esperantisto. Kia stranga estas ja la vivo. Neniu scias kiam li forpasos. Almenaŭ plurestas la memorajxoj kiuj estante belaj eternigas la homon.

Akceptu kara ankaŭ miajn elkorajn kondolencojn,

Bardhyl Selimi, Albanio

Karaj geamikoj,

Multaj el vi cheestis en la entombigo hodiaŭ. Krom la propra familio kunvenis ankaŭ la verda. Oni "sidas Shiva" en la hejmo de la fratino, Rivka Margalit, Str. Kakal 16, Rehovot (apud instituto Weizman), tuttage kaj vespere ekde dimanĉo ĝis merkredo. Telefonoj: 08-9461107, 054-479 3633.

El la tuta mondo fluadas kondolencmesaĝoj, kiujn ni publikigos en speciala memorpago en la retejo de ELI. Kompreneble aperos ankaŭ mesaĝoj alvenantaj el Israelo – eblas skribi al eli@esperanto.org.il au en la Facebook paghoj <http://www.facebook.com/eldad.salzman> au <http://www.facebook.com/profile.php?id=1530849334> (mia).

Hierau, kelkajn minutojn antaŭ ol mi ricevis la sciigon pri la forpaso, mi informis vin ke la venonta klubkunveno okazos post la pasko, la 17an de aprilo. Nature tiu vespero estos dedichita al la memoro de Josi, chiu bonvenas dividi personajn memorojn.

Pacan sabaton,
Amri

שלום חברים,
רבים מאיתנו נפגשו היום בהלוויה של יוסי. יושבים שבעה בימים א-ד אצל אחותו, רבקה מרגלית, רח' קק"ל 16
רחובות (ליד מכון ויצמן והפקולטה לחקלאות), טלפונים 08-9461107, 054-479 3633. להודעות השתתפות
(שיפורסמו באתר האגודה לאספרנטו)
eli@esperanto.org.il
ובדפי הפייסבוק של אלדד <http://www.facebook.com/eldad.salzman>
או שלי <http://www.facebook.com/profile.php?id=1530849334>
מפגש המועדון בתל אביב ב-17.4 (מיד אחרי חפשת הפסח) יוקדש לזכרו של יוסי, כולם מוזמנים לחלוק
זכרונות אישיים.
שבת שלום,
עמרי

Antaŭtempe foriris el la vivo la sindonema esperantisto, abnegacia entuziasmulo kaj simple -- Bona Homo.

Dum mi vivas, mi memoros lin.

Mi funebras kaj kondolencas al familio de Josi kaj al liaj proksimuloj.

Mikael Gishpling (Jerusalemo)

Estimata,

Tre doloras la forpaso de nia kara Josxi Shemer. Li por cxiam postlasis spurojn en niaj mensoj, inter alie per sia amo al la jida kulturo, kiun li zorge kaj regule prezentis kaj ilustris per la de li kolektitaj, bonhumoraj anekdotoj.

Transkontinenta estu la doloro, sed ie super ni brilos stelo kun lia nomo...

Ingvar Enghardt, prez.

Esp.klubo de Stokholmo

Saluton,

ankaŭ mi tre bedaŭras la morton de Yossi kaj sendas miajn plej sincerajn kondolencojn. Mi deziras forton al familianoj, amikoj kaj konatoj. Li ripozu en paco! Yossi, vi mankos al ni!

Amike, Martin Schaeffer (Meksiko)

Kara,

I read your note below. Shocked and saddened by Josi's death. He and I spoke several times abt his medical situation which in some ways resembles that of my boyfriend. Very startling, sad news. Thinking of Shauli, who always seems to be at sea...

Esther Shor (Usono)

Karaj,

en mia propra nomo kaj en la nomo de PEA mi transdonas al ĉiuj israelaj esperantistoj, al la filo de Joŝi kaj Liaj familianoj, al ĉiuj Liaj geamikoj miajn plej sincerajn kondolencajn vortojn.

Mi fieras konsideri Joŝi-on kiel personan amikon, des pli la hodiaŭ veninta trista informo estas por mi vunda.

Li restas en mia koro kaj memoro kiel bona kaj honesta homo, kiel modela esperantisto.

Modeste, sed elkore kuniĝas en la omaĝa memoro pri Joshi ankaŭ la Redakcio de la Pola retRadio en Eo el Varsovio, dedichante al Lia memoro omagxan momenton.

Pacon al Li,

Barbara Pietrzak (Pollando)

E elsendo el la 30.03.2012

Posted by email

RetRadio_30,03.2012.mp3

(download)



Click here to download:

RetRadio 30,03.2012.mp3 (21.58 MB)

La hodiaŭa vendreda E-elsendo de la Pola retRadio ĉe <http://retradio.posterous.com> enhavas la kulturan bultenon kaj E-informojn. Kun profunda bedaŭro la Redakcio adiaŭas la forpasintan Josi Shemer el Israelo. La programom kompletigas renkontiĝo kun la aŭskultantoj kadre de la ĉiusemajna Leterkesto

Josi Shemer estis konata al kaj amiko de ankaŭ multaj Finnlandaj esperantistoj, inkluzive min. La modesta kaj bonhumora figuro lia estis inda ekzemplo al cxiu esperantista aganto.

Ni esprimas nian profundan kondolencon okaze de la tro frua forpaso de nia samideano.

Tuomo Grundström, prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando

Kara Amri !!
Halina jam skribis kodolencajn vortojn al vi kaj Israela E- movado.
Mi povas aldoni, ke mi konis Lin 32jarojn. Tio por mi etas tre trista sciigo.
Granda perdo por Esperantujo.
Kun pensoj pri Li .
Jolanta Kieres Pollando Nowy Sącz

Kara Amri,

De la parto de EEU, kaj de mi mem, mi sendas plej profundajn kondolencojn al la familio de Josi, kaj al la tuta israela Esperanto-komunumo. Mi ne bone konis Josi, sed foje babilis kun li kaj trovis lin tre simpatia. Dio benu lian noblan animon!

Kundolore kaj malghoje.

Seán O'Riain (Ireland)

Mi jxus ekscis ke mia amiko Josi Sxemer forpasis!
Kia granda bedaŭro!

Mi havis bonxancon koni lin persone, li gastigis min en lia domo, zorgis pri mi dum mia restado en Israelo. Li cxiam estis simpatia, afabla, sxercema, tutkore dedicxita al esperanto kaj esperantista movado. Mi neniam forgesos lin, nian kunan promenadon tra ortodoksa kvartalo en Tel-Aviv en sxabato, pri lia amikeco. Mi kondolencas, Gefratajn brakumojn cxefe al lia filo Shaul Shemer, via patro certe restos en mia memoro por cxiam kaj gefratajn brakumojn por cxiu miaj esperantaj geamikoj el Israelo. Granda perdo por nia esperanta movado.

Amike,
Irmina Szustak Varsovio, Pollando



Forpaso de elstara esperantisto chiam alportas al ni dolorsenton. Transdiru kondolencojn el china esperantisto al la familianoj de Josi Shemer.

Wu Guojiang (Chinio)

--- 12年3月30日

From: [Allan Lemos](#)
Date: 03/30/12 23:21:21
To: [Elona Meyronne](#)
Subject: Re: Fw: [ELI-Listo] Memore al Josi

[Elona,](#)

[Permesu min esprimi al vi miajn kondolencojn pro la trista forpaso de Josi.](#)

[Frate,](#)

[Allan](#)

On Fri, Mar 30, 2012 at 16:38, Elona Meyronne <meyronne@netvision.net.il> wrote:

Kara Amri,

kun granda ŝoko mi legis vian mesaĝon pri la morto de Josi. Fine de januaro li skribis al mi antaŭ sia enhospitaliĝo, ja siatempe, kvankam estis riska operacio, li estis sufiĉe optimisma, eĉ ŝercis ankoraŭ, ke, pro la izoleco, li havos apartan ĉambron kaj bonajn manĝojn, kaj ĝuas pli bonajn kondiĉojn ol kutime ĉe UEA ... Do, ni memoru lin kia li estis, ĉiam ŝercema, bonhumora kaj agrabla homo!

Mi nun ne scias, ĉu vi alskribis ankaŭ kelkajn IF-anojn, sed mi faros tion poste, almenaŭ por la partoprenintoj en Nördlingen, al kiuj li (r)estas en elstara memoro pri sia bona prelego pri la hebrea lingvo. Ĉu vi memoras el pratempo fam. Rawlinson el Anglio? Ili kutime partoprenis kun du etaj infanoj, ŝi estis koreanino kaj oni nomis ŝin Belaluno, nun mi aŭdis de Heleno, ke ankaŭ ŝi mortis antaŭ kelkaj tagoj, pro kancero. La infanoj nun havas 9 resp. 11 jarojn.

Mi longe hezitis, ĉu aĉeti SIM-karton por interretumo en Lanzarote; mi faris kaj nun nur ricevas malĝojigajn informojn ... C'est la vie! Dumtage, la vetero estas tiom bona (israeleca!) ke ni malkovros la ravecojn de la insulo, kaj ili estas abundaj ĉi-tie!

Same malĝoje kiel vi,
kore salutas, via HDP (Germanio)

Kara Amri,

Mi ege bedaŭras. Mi bone amikiĝis kun li en Jokohamo.

Amike,

Geoffrey Sutton (Britio)

Mi sendas el Brazilo miajn elkorajn kondolencojn pro forpaso de Josi Shemer.

Amike,

Eida Lima (Brazilo)

Mi tre bedaŭris kaj nun mi estas malĝoja kun larmoj pro la forpaso de s-ro (Josi) Josef Ŝemer. Tio estis nekredebla sciigo. Ĉar li donis bonegajn zorgadon kaj amikecon al mi dum mia vojaĝo.

Bonvolu akcepti mian plej sinceran kondolencon al liaj parencoj kaj Esperantistoj en Israelo.

--- On Sat, 2012/3/31, ESTHER SEBBAN <esti33333@hotmail.com> wrote:

Kara Ĵunku

Bedaŭrinde estas vere (Josi) Josef Ŝemer forpasis
,Mi estas ege malĝoja estas ne imageble perdo
Jen kion li sendis al mi por klarigi al geamikoj
en Germanio kial li ne partoprenos IF
amike 🏠
esti aŭ ne

Kara Esti,
Jen tio, kion mi promesis sendi al vi:
Mi havas malsanon cxee la OSTA MEDOLO (מוח עצם . angle: bone marrow. france:
Moelle osseuse) kaj pro tio la osta medolo ne produktas sufiĉe da sango-globuloj.
Tre tre versxajne mi devos fari greftadon (השתלה)de osta medolo.
Josi

kaj jen kion ni ricevis de Amri

Karaj geamikoj,
Anatu kelkaj minutoj atingis min (pere de Eldad kaj la fratino de Josi) la shoka sciigo.
Tio okazis antaŭ du horoj, post malbonigho en lia post-operacia situacio en la lastaj
tagoj. Mi nun informas nur la proksimajn geamikojn kaj aktivulojn.
Tuj kiam ni scios pliajn detalojn (unuavice pri la entombigo)
mi sendos mesaghon al chiuj membroj kaj internacie.
Funebre,
Amri

Date: Sat, 31 Mar 2012 13:46:55 +0900
From: [verdaoazo](mailto:verdaoazo@yahoo.co.jp)
@yahoo.co.jp
Subject: RetRadio el Pollando
To: esti33333@hotmail.com

Kara Esti

Mi surprizigis ke RetRadio el Pollando elsendis la novajn.
Cu tio estas vere ?
Mi atendos vian respondon.
.Junko

Junko OSIMA
verdaoazo@yahoo.co.jp

Karaj geamikoj

La forpaso de Josi Shemer tre tushas min kaj estas forta bato por via asocio. Antaŭ unu jaro mi estis lia gasto kaj li parolis pri malsano, sed en esperiga maniero. Mi havas penon kredi, ke tiu batalanto ne plu estas inter ni. Kiel vi skribis, li estis piliero, internacie tre konata kaj shatata, ankaŭ pro lia humuro, la judaj spritajhoj. Mi taksis lin pli aĝa, do li mortis vere tro frue.

Tiu trista novajho igas min repensi pri la lastjara kongreso kaj rondvojaĝo kun vi, karaj memoroj revenas spontane. Foje mi demandas min, kiuj anstataŭas la pionirojn.

Mi kondolencas al viaj asocioj kaj funebras kun vi. Kun koraj sentoj kaj salutoj al vi ĉiuj.

Bruno Graf

031 921 44 59

bgraf.o@bluewin.ch

Kara Amri,

Malbonega novajxo! Ni sciis, ke li estis malsana, sed ni forte esperis, ke li iom post iom resanigxos.

Bonvolu transdoni al lia familio kaj al la israelaj esperantistoj miajn sincerajn kondolencojn.

Se mi citu inter multajn mian plej bonan memorajxon pri li: estis vera plezuro cxeesti lian AIS-kurson en IF pri la hebrea lingvo. Kia agrabla, efika maniero instrui, tiel ke la studentoj ridas dum preskaŭ la tuta kurso! Mi ne devus citi tion, en momento de funebro, sed belas, ke gxuste tian pozitivan bildon de li mi cxeefe memoros. Kaj venas la grandaj bedaŭroj kaj manko, ke neniam plu ni povos gxui lian simpatian humuron.

Triste kaj profunde cxagrenigita,

Claude

Hieraŭ estis tiu malfelicxa tago, kiam ni eksciis pri la forpaso de Josi Shemer. Mesagxon pri tio mi sendis sed ne liste (nur al Amri por plusendo al koncernatoj).

Amike,

Claude Nourmont (Francio)

Karaj,

Pro la perdo de la tre estimata Josi Shemer, volu akcepti mian koran kondolencon.

Samideane,

Aparecida Araujo

SanPaulo/Brazilo

Kara Amri,

Mi estas komencanto en Esperanto. Do mi nun preferas skribi en anglalingvo. I was very saddened to hear about the passing of Josi, who I admire very greatly. I am still trying to get over the shock. I can't get over to Tel Aviv to sit shiva with the others. But please give my condolences to Rivka and the family. I will telephone to the number below.

Amike, Larry Taub (Israelo)

Karaj geamikoj,

Ekde la forpaso de Josi ne chesis alvenadi kondolencoj el la tuta mondo, kiuj montras kiom amata kaj populara li estis. Mi kunmetis ch. cent mesaghojn ghis nun alvenitajn – retroshte kaj per Facebook - en kreskantan dosieron, kiun ni planas eldoni papere kiel memorlibro. Vi povas ghin viziti en la retejo de ELI, che <http://www.esperanto.org.il/dosieroj/shemer.pdf> (atingebla ankaŭ rekte de la hejmpagho).

Koran dankon al chiuuj kondolencantoj, nome de la familio kaj de ELI. Via subteno helpas nin en tiu malfacila tempo.

כמאה הודעות תנחומים מכל העולם בדף זיכרון ליوسی שמר באתר האינטרנט של האגודה לאספרנטו בישראל

Amike, Amri

Amri Wandel

Prezidanto de E-Ligo en Israelo (ELI)

amri@huji.ac.il

<http://www.esperanto.org.il/>

Saluton Amri

Mi dankas al vi por vian leteron en la reto.

Speciale por la photo.

Mi gardos ghin.

Amike,

Judith Epstein (Israelo)

Karaj,

eble vi jam informiĝis, jen la malĝoja informo, ke antaŭ du tagoj mortis nia israela amiko kaj IF-ano Josi Ŝemer, en aĝo de nur 61 jaroj; la entombigo okazis hieraŭ.

Pasintmonate li pasis komplikan operacion el kiu li estis malrapide resaniĝanta. Fine de januaro, tagon antaŭ sia enhospitaliĝo, li ankoraŭ skribis al mi kaj estis sufiĉe optismisma, ja eĉ iom ŝercis. Antaŭ Xanten li skribis jenon: "Espereble mi estos kuracata dum la proksima jaro kaj tiam povos ĝojege reveni al viaj tre, tre bonaj ĝojdonaj eventoj!".

La sorto havis alian decidon.

Alia malagraba informo, eble kelkaj el vi memoras familion Rawlinson el Anglio, antaŭ jaroj ili plurfoje partoprenis kun etaj infanoj. La edzino, koreanino kun voknomo Belalumo, mortis meze de marto, en aĝo de nur 52 jaroj.

Ni kondolencas.

Kore salutas,

HDP

jarfine al IF 29-a IF en Dortmund

Aliĝstato 44 personoj el 11 landoj
Retpoŝto HDP@internacia-festivalo.de
Interreto www.internacia-festivalo.de

Karaj,

nur chi momente mi legas la malgajan mesaghon pri la forpaso de Josi. Kvankam nur malofte ni rekontighis kaj precipe kiam la gepatroj vizitadis Israelon, li tamen estis por mi unu el la chefaj vizaghoj de la E-movado. Li iniciatis tiom multe da aktivecojn kaj projektojn, partoprenis en preskau chiuj eventoj kiuj okazis en Israelo kaj eksterlande kaj sciis enmiksigi chiujn partoprenantojn por ke oni sin sentu komfortabla.

Ne nur la E-movado perdas senlace aktivulo, sed multaj Esperantistoj perdas amikon.

Mi deziras chiujn kaj precipe Shaul forton dum tiu chi malfacila periodo.

Chaja Peer- Bakker (Jerusalemo)

Estimata samideano,

mi apartenas al 240 esperantistoj, kiuj dum tri jaroj ricevadis de Josef Shemer liajn anekdotojn. Mi kolektis ilin kun datoj de dissendo, eble ili estos utilaj por tiuj, kiuj kolektos lian verkaron.

Amike

Miroslav Malovec

Kara s-ano,

Multan dankon por via kontribuo.

En parolo nome de ELI en la entombigo de Josi mi diris i.a.

La ŝercoj pri juda humuro ŝercas kiujn vi sendis ĉiusemajne al centoj da sekvantoj ĉirkaŭ la mondo fariĝis ege popularaj. Antaux la operacio vi skribis ke estos paŭzo de du monatoj en la ŝercoj ... kaj nun ŝajnas ke la paŭzo daŭros eterne.

Via kolekto bele memorigos pri Josi, mi proponos aldoni ĝin al la memora retpagho.

Danke, Amri

Kara s-ro Amri

Mi tre surprizig^{is} pri la forpaso de s-ro Jozef Shemer kaj mi demandis tion al israela amikino Esti. Mi sciis veron kaj mi larmis pro malg^ojo. Fakte mi gastig^{is} c^e lia apartamento en Tel-Avivo. Mi rememoras, ke li gvidis min al la juda muzeo kaj li pasie klarigis la mizeran historion temas pri Judo.

Bonvolu akcepti mian plej sinceran kondolencon al lia filo, parencaro kaj Esperantistoj en Israelo.

Sincere salutas,

J^unko OSHIMA (Japanio)

Estimata samideano,

mi apartenas al 240 esperantistoj, kiuj dum tri jaroj ricevadis de Josef Shemer liajn anekdotojn. Mi kolektis ilin kun datoj de dissendo, eble ili estos utilaj por tiuj, kiuj kolektos lian verkaron.

Amike

Mi nun trovis lian invitilon al la anekdotoj. Do mia kolekto ne estas kompleta, cxar mi estis nur 183-a abonanto.

Mi faris pri li Vikipedian artikolon.
http://eo.wikipedia.org/wiki/Josef_%C5%9Cemer

Miroslav Malovec

Kara Amri,

Fabienne kaj mi estis vere shokitaj de la mortinformo pri Josi, kiun mi eksciis de Vi, tra Boris Kolker. Nur kelkajn horojn pli frue ni audis tre bonajn novajhojn pri la kancero de Fabienne, sed ne eblis longe ghoji. Nur antau kelkaj semajnoj ni korespondis kun Josi pri lia atendata san-plibonigho... Ni vidis la kondolenclibron, kaj ni komprenis ke nia rilato kun Josi estis unu ligilo en tre richa amikara reto... Granda familio postploras lian foriron. Necesus diri tiom da aferoj, sed malfacilas.

amike
Fabienne kaj Istvan Ertl

Kara Amri,

Kiam vi informis pri la forpaso de Josi, mi ne havis vortojn pro troa sxoko.
Poste ankaux Tsvi Sadan informis min. Kia realo!
Post la Bjalistoka UK mi kun mia edzo Minoru vizitis la tombejon de Zamenhof en Varsovio. Tiam ankaux Josi kun la filo vizitis la tombejon.
